

Protokolo de la Komitato de ILEI

de la **tria** kunsido de la komitato dum la 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago (Danio), la 21an de julio 2011.

1. Kunsido de la komitato okazis en Kopenhago (Danio) en la tago de la 21a de julio, 2011 ekde 09:00.
2. Ĉeestis: kvorumo de 31 komitatoj.
3. La kunsidon gvidis: la prezidanto de ILEI - Stefan MacGill
4. Protokolanto: Teresa Liberska
5. La prezidanto bonvenigis la alvenitan komitatanon el Aŭstralio
6. Tagordo de la nuna komitatakunsido estis prezentita tabule.
7. Reveno al du el la punktoj lasitaj dum la antaŭa komitatkunveno de la tago de la 19a de julio 2011:

a) La elekto de nova sekretario.

La komitato tiam ne sukcesis trovi novan sekretario. Intertempe, tuj post la lasta kunveno, aperis propono por nova sekretario – oni proponis Huang Yinbao el Ĉinio por la 3-jara periodo.

- kandidato Huang Yinbao (Trezoro) el Ĉinio prezentis sin.
- per aplaŭdo, komitatoj indikis sian akcepton por Huang Yinbao, kiel nova sekretario;
- La prezidanto de ILEI gratulis al la nova sekretario kaj bonvenigis lin al la estraro.

b) Nova aliĝpeto de Meksiko.

Kronologie ĉi tiu temo estis traktita meze de la regulara temo, kiam la koncernatoj povis alveni. S-ino Mallely Martinez Mateos kaj s-ro Martin Schaeffer prezentis la planojn pri sekcia fondo en Meksiko, kadre de nacia kongreso en septembro. Komitatoj akceptis la novan landan sekcion, kiu ekvalidos post la fondokunsido; voĉdono: 31 – jes.

8. Ŝanĝoj en la Interna Regularo de ILEI.

Komitatoj devis voĉdoni pri la ŝanĝoj en pluraj punktoj de la regularo, kiuj estis anticipe konigitaj kaj surloke projekciitaj. Tiuj tekstoj estas rigardeblaj en la liga retejo. Komitatoj havis kvar eblecojn dum la voĉdono: *jes; ne; sindeteno; plu diskutu pere de la regulara komisiono.*

Punkto 1.1 (difino)

oni aldonis la novan punkton kun la nova teksto; voĉdono: 30 voĉoj – jes;

Punkto 4.9.1 (eldonaĵoj)

voĉdono: 29 – jes; 2 – ne;

Punkto 4.9.3 (eldonaĵoj)

Al la enhavo de la punkto, oni aldonis la tekston: „Pri la konferenca libro respondecas la konferenca teamo” Post diskuto oni proponis, ke la tuta frazo estu skribita en la sekva vico: „Pri la konferenca libro respondas konferenca teamo, pri aliaj eldonaĵoj decidis estraro”; Pro la manko de unuanimeco, la komitato decidis plusendi la punkton al la komisiono: 9 – jes; 6 – sindeteno; 16 – plu diskutu;

Punkto 5.2.1 (membroj)

La unuaj du frazoj de la propono estas akceptitaj. La tria rekomenda frazo transiru al konvena gvidilo (pri membro-administrado).

Punkto 5.2.3 (membroj)

Rezulto de la voĉdono: 31 –jes. La ŝango estis akceptita.

Punkto 6.1.1 (financaj rimedoj)

Ŝanĝoj en la enhavo rilatis al la du limdatoj, ke ili estu videblaj unuloke kaj, ke la teksto montru la rilatojn inter ili. La ŝanĝo – akceptita; voĉdono: 29 – jes; 2 – ne;

Punkto 7.1.2 (komitato)

La revizio bezonas multan diskuton, tial aperis propono: la punkto estu transdonita al la dumkonferenca komisiono por plua studado. Estas kelkaj diskutdemandoj:

- Ĉu la nombro de la sekciaj komitatanoj estu rekalkulitaj ĉiujare surbaze de la sekcia membronombro aŭ estu fiksita por la tri jara mandato de la komitatano?
- Kiom da voĉoj rajtas arigi unu persono?
- Kiel pli precize funkcii anstatuado?
- Kiel ni forigu la malbelan svarmadon de interkrampaj pluraloj (j) tra la teksto?

Al tiu punkto devos aldoniĝi pluraj pliaj precizigoj; tiel ke fine povos esti, ke la enhavo sidu kaj Statute kaj Regulare en pli ol unu punkto.

Punkto 7.1.6 (komitato)

La punkto ne estis protokolita, ni supozas, ke ni erare transsaltis unu lumbildon. Sekve, la demando estos privoĉdonata rete. La propono estas aldoni unu frazparton (verde) pri ekŝigo de estrarano:

„...ceteraj estraranoj respondecas pri daŭrigo de ties laboro, ĝis anstataŭanto estas enpostenigita, kun la helpo de la elekto-komisiono.”

Punkto 7.1.7 (Financaj rimedoj).

La punkto rilatas al la kontrolkomisiono. Al la enhavo de la punkto oni aldonis:

- kontrolkomisiono pri financoj konsistas el minimume 2 membroj;
- ĝi havas 3-jaran mandaton, kiu komenciĝas en la 1a de januaro en la jaro post la estrara elekto.
- pro la neceso fizike enrigardi dokumentojn dum la revizado, la komisionoj prefere loĝu samlande kun la kasisto.

Dum la diskuto ĉe ĉi tiu punkto, oni debatis pri la optimuma dato por la ekvalido de nova komisiono. La diskuto finiĝis per voĉdono: 31 – jes; La ŝango estis akceptita.

Punkto 7.1.8 (komisionoj)

Oni aldonis du frazojn: “Komisiono havas prezidanton, kiu povas, sed ne devas esti estrarano. Ĉiu komisionano havas respondecan estraranon, kiu sekvas ĝiajn laborojn.” La ŝanĝon oni akceptis per la voĉdono: 31 – jes.

Punkto 7.1.13 (komitato)

Oni ŝanĝis la tekston de la punkto. La nova teksto estas: „Ĝi povas senrajtigi komitatanon, se la deleginta sekcio agis kontraŭstatute”.

La komitato jam konstatis, ke en la realo individuaj membroj neniam elektis komitatanojn, kaj jam decidis forigi tion; sekve necesas konformigi la tekston al tiu decido. Vidu sube.

Punkto 7.1.14 (komitato)

Laŭ la nuna teksto la komitato fiksas la membrokotizon por ‘unu jaro’. Laŭ la nova enhavo ĝi fiksas memebrokotizon por la ‘sekva jaro’. Oni anstataŭigis la vorton *unu* per la vorto *sekva*. Komitatanoj akceptis la ŝanĝojn por 7.1.13 kaj 7.1.14 per unu voĉdono. La rezulto de la voĉdono: 31 – jes.

Punkto 7.1.18 (komitato)

Propono de la ŝanĝo: anstataŭigo de la vorto *malfondo* per la vorto *malfondi*. Diskuto: sed kia kunsido povos malfondi – ĉu reta aŭ nur fizika? Oni atentigis, ke reta voĉdono prefere estu permesata – eble la kialo proponi malfondon estas malkapablo fizike kunvoki la komitaton. Estos ĝuste la malkapablo fizike kunvoki la komitaton. Komitatanoj decidis prokrasti tiun punkton, sendante ĝin al la komisiono. Voĉdono por la prokrasto: 31- jes.

Punkto 7.2.1 (estraro)

Propono: apartigo de la teksto de la du deklaroj, kiuj estis en la teksto.

Konstato de la prezidanto: ĝi estas mallogika kombino de du deklaroj.

Decido de komitatanoj post la diskuto: la unua frazo – restu en la sama loko.

Opinio de la komitatanoj: ĝi spegulas la modernan aspekton de ILEI, kun reta konsultado de la komitato.

Decido de komitatanoj post la diskuto pri la dua frazo: la duan frazon kun la ne-ŝanĝita teksto oni transmetu la alia loko.

Oni akceptis la tekstenharon kaj la proponon pri la apartigo de du deklaroj per la voĉdono: 31 voĉoj – jes. La komisiono plustudos kie loki la frazojn (punkto 7.2.3 estas libera).

Punkto 7.2.2.2 (estraro)

Priskribo de la taskoj de la sekretario. La punkto prenis la novan tekston:

La sekretario faras la protokolojn de la kunsidoj de la estraro kaj la komitato, tenas la kontakton kun la sekcioj, reprezentantoj, individuaj membroj kaj la komitatanoj, kompilas la estraran jarraporton kaj sendas la dokumentojn por la komitatakunsido al la komitatanoj. La sekretario kutime plenumas la membro-administradon, sed tio ne estas deviga.”

Propono: Principe la sekretario respondecu pri komitat-protokolado, sed la komitatoakceptu alian solvon, se la sekretario ne partoprenos la kunsidon. (Detalajn komentojn oni povas vidi en la plena regular-revizia dokumento).

Diskuto pri la respondeco kaj pri la membro-administrado: Argumentoj de komitatanoj: la membro-administrado devas esti bone zorgata kaj ĝi estas respondeca tasko. Bona membro-administrado estas principe la devo de la sekretario; sed la estraro rajtas trovi aliajn solvojn. La estraro devas prizorgi, ke oni havu sufiĉajn rimedojn por la administrado, tiel ke ĝi estu bone prizorgata.

Decido: komitatanoj decidis akcepti la novan tekston ĝis la lasta frazo kaj la lastan frazon oni transdonis por plua diskuto al komisiono. Voĉdono: 31 – jes. La supra decido estis akceptita.

Punkto 7.2.2.3 (estraro)

La propono mankis en la lumbildoj, sekve ne estis traktita. Temas pri nur unuvorta aldono:

La estrarano pri financoj registras ĉiujn en- kaj elspezojn de la Ligo, zorgas pri la enkasigo de la kotizoj, faras la finanĉan jarraporton, **bilancon**, kaj la buĝeton por la sekva jaro kaj sendas tiujn dokumentojn al la komitatanoj.

Tiu modifo estas sekve traktota per reta voĉdono. Bilanco estas esenca parto de niaj financoj.

Punkto 7.2.2.4 (estraro – rolo de ceteraj estraranoj)

Oni aldonas trian frazon al la ĝisnuna teksto:

Realigo de agadplanoj kaj kunlaborigado de la sekcioj en la kampoj sub sia respondeco

Voĉdono: 30 – jes; 1 – sindeteno; la ŝanĝo – akceptita.

Je tiu punkto la traktado de la regularo devis ĉesi. La komitato konsentis, ke la restantaj punktoj (proksimume dek) povos esti rete voĉdonitaj, kaj konfirmitaj (laŭ la retvoĉdona regularo) en la sekva fizika kunsido.

10. Estonta agado– diskuto laŭ subaj punktoj:

a). Eblaj diskuto-temoj:

- sekva konferenco
- perspektivoj pri konferencoj
- membro-varbado
- aktivigo de sekcioj
- strategioj por eksteraj rilatoj
- ideoj por buĝeto 2012

b). Estontaj Konferencoj

- oni havis tri lokojn por elekti ejon por sekvonta konferenco: la decido estas Kunming.
- oni akceptas similan programan skemon kiel antaŭe;
- la elektita konferencejo estas proksima al la universitata medio;

c). Sugestoj de la komitatanoj:

- aldoni kurson por la publiko dum konferenco;
- aldoni sekcion aŭ programerojn por blinduloj: estas multe da informoj pri instruado al blinduloj; oni eĉ proponas lingvan ekzamenon por ili; se io nova okazas en instruado de Esperanto, tio signifas, ke ni devas agi por nova strategio;
- Radojica Petrovic levas regularan frazon: ‘neniu rajtas partopreni en konferenco senpage’. Kontraŭe, la regularo diras: ”La estraro rajtas aprobi rabaton en la kotizo por tiuj, kiuj laboras en la organizo kaj kontribuas al la programo de la konferenco, depende de la efektiva laboro dum ĝi.’
- Atentigo de komitatanoj: ekskursoferantoj, agentejoj devas esti skribe kontraktitaj.

11. Opinioj, demandoj, respondoj, proponoj – lasta punkto de la kunsido.

Prezidanto MacGill instigas komitatanojn, ke ili esprimu proprajn opiniojn aŭ starigi demandojn rilate la hodiaŭaj temoj de la kunsido. Ĉefe li volus ankaŭ aŭdi: „ĉu estas iu, kiu volus okupiĝi pri novaj aŭ ne plenumitaj aferoj?” Li ankaŭ instigas komitatanojn al la interreta laboro, pli intensiva kaj pli vasta.

a). La prezidanto respondas al demando pri la meĥanismoj por reta voĉdonado: Proponoj estu klare formulitaj; komitatanoj respondu per nova aparta mesagho, ne tra la grupa fadeno. La voĉdonmesagho havu klaran indikon ‘VDON-K’ kaj enhavu nenion pli ol la voĉdono. La komitato rekomendas al la regulara komisiono, ke retaj voĉdonoj havu pli severan kvorumon (duono) ol fizikaj kunsidoj, kaj ke retaj voĉdonoj estu konfirmitaj dum la sekva fizika kunsido de la komitato. Komitatanoj voĉdonis: la rezulto: 31 – jes. La propono akceptita.

b).Aliaj petoj kaj demandoj:

Ne estis pluaj demandoj de komitatanoj.

12. La prezidanto informis, ke la protokoloj de la unuaj du sesioj estas pretaj kaj afiŝitaj. La akcepto de la protokoloj okazos per reta voĉdonado.

13. La Prezidanto dankis al ĉiuj pro la aktiva, kunlaborema kaj efika partopreno kaj la valoraj diskutoj dum la kunsidoj.

14. Fermo de la kunsido – la kunsido estis fermita je la 13.00h.